**Gevonden Objecten - 30 mei 2018 - Aantal in Plaats 02 - Doos 00 : 4**








| ID | Nr | Titel | Jaar | Datum in | Hoogte in mm | Breedte in mm | Diepte in mm | Plaats | Doos | Object | Attr |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0001 | 02.00.01.0 | Kartludo KAN-U-GO | 1934 | 0000-00-00 | 120 | 80 | 20 | 02 | 00 | 01 | 0 |

| Afbeelding | Afbeelding2 | Afbeelding3 | Link naar website | Materiaal | Categorie | Ontwerper |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **0001_02.00.01.0.jpg** | **x_02.00.01.a.jpg** | | **https://boardgamegeek.com/boardgame/1648/kan-u-go** | papero-kartono | | T.G. Porter (Printers) Ltd., Leeds 9 |

| Beschrijving |
|---|
| Kartludo KAN-U-GO, Esperanto-versio, kun skatoleto, kartoj kaj regularo.<br>La originala anglalingva versio estis lanĉita en 1934 de T.G. Porter (Printers) Ltd., Leeds 9, Britio.<br>Sur la unua interna paĝo de la regularo estas skribita ''Donaco de S-ro Groverman \| 2/5/1939'. Temas pri advokato Robert Groverman, °1860 - +Brugge 1951, membro de Bruĝa Grupo Esperantista, akiris diplomon por Esperanto-instruado en Gent je 14 novembro 1920. (informoj el i.a. revuoj Belga Esperantisto kaj Flandra Esperantisto)<br>Pri la Esperanto-versio ĝis nun ne estas trovita iu informo. |








| ID | Nr | Titel | Jaar | Datum in | Hoogte in mm | Breedte in mm | Diepte in mm | Plaats | Doos | Object | Attr |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0020 | 02.00.02.0 | Kartludo Waddington 'Lexicon' | 1935 | 0000-00-00 | 96 | 60 | 30 | 02 | 00 | 02 | 0 |

| Afbeelding | Afbeelding2 | Afbeelding3 | Link naar website | Materiaal | Categorie | Ontwerper |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 0020_02.00.02.0.jpg | x_02.00.02.a.jpg | x_02.00.02.s.jpg | http://www.wopc.co.uk/waddingtons/lexicon/ | papero, kartono | | Waddington |

| Beschrijving |
|---|
| Kartludo 'Lexicon' eldonita ĉ. 1935 de Waddingtons Games Ltd (en 1994 akirita de Hasbro). Kartoj 89 x 58 mm en duobla ujo (interna kun nur la kartoj, ekstera (difektita) kun interna ujo kaj kartoj kun aspekto de libreto), Teksto sur ekstera ujo: WADDINGTON \| LEXICON \| Regd. N°529991 \| KART-LUDO \| AMUZA \| EKSCITA \| INTERESA. Laŭ aldonita etikedo donaco de Leona Meurrens, Leuven (B); sur la etikedo estas krome menciita 'DE AĜISZO'. Ĝis nun ne estas trovita mencio en e-gazetaro pri la esperanta versio. EHC (Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg) havas ekzempleron en bona stato, kaj krome 16-paĝan libreton kun regularo. |



**BESTAJ SILABOJ**

**Ideala kluba ludo – tre taŭga por surplanka ludado!**

Troviĝas en la kartaro: 115 ludkartoj; 5 bildkartoj; 1 kontrollisto
Estas sufiĉe da ludkartoj por kompletigi 25 bestajn vortojn. Ĉiu vorto entenas po 3, 4 aŭ 5 silabojn kaj ĉiu ludkarto montras po unu silabon. Komenckartoj surhavas majusklan literon kaj malgrandan bildon de la besto.
Bildkartoj montras bildojn de la 25 bestoj; ludanto rajtas rigardi bildkarton dum la ludo por helpi sin identigi la bestojn. La kontrollisto listigas la vortojn elektitajn kaj montras la dividon laŭsilabe.

**Jen kiel ludi**
La ludo taŭgas por ĝis 5 ludantaj grupoj/individuaj ludantoj. (=ludanto)

1/ Disdonu po unu bildkarton kaj po 7 ludkartojn al ĉiu ludanto.
2/ Lasu la restantajn kartojn en staketo kun la vortero malsupre.
3/ Ludantoj ludas laŭvice. Komencu la ludon iu, kiu ricevis komenckarton.
4/ Ludanto rajtas en sia vico meti surplanken/surtablen kiom ajn da kartoj eblas. Vortoj kresku laŭsilabe aŭ nova vorto komenciĝu. Estas strategie sencohava provi ne meti antaŭlastan silabon kiam ne necesas, por malhelpi al la sekvantaj ludantoj.
5/ Se ludanto ne havas taŭgan karton por aŭ kreskigi vorton laŭsilabe aŭ komenci novan vorton, tiu devas remeti suben de la staketo tri el siaj kartoj kaj repreni tri de la supro.
6/ Ludanto prenu kaj retenu – ĝis elĉerpiĝas la staketo – tiom da kartoj kiom estis uzitaj en vico por ĉiam havi je sia dispono sep kartojn.


**Jen kiel poentumi**
1/ Ludanto ricevu po unu poenton por ĉiu ludkarto metita surplanken/surtablen.
2/ Ludanto fininta vorton ankaŭ ricevu tiom da poentoj kiom enhavas silabojn la vorto ¼us finita
3/ Gajnas tiu, kiu unue forigas sian ludkartaron post kiam elĉerpiĝis la staketo.
4/ [illegible] de la poentsumoj de la ludantoj tiom da poentoj [illegible] da kartoj.





| ID | Nr | Titel | Jaar | Datum in | Hoogte in mm | Breedte in mm | Diepte in mm | Plaats | Doos | Object | Attr |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0021 | 02.00.03.0 | Kartludo 'Bestaj Silaboj' |  | 0000-00-00 | 105 | 75 | 32 | 02 | 00 | 03 | 0 |

| Afbeelding | Afbeelding2 | Afbeelding3 | Link naar website | Materiaal | Categorie | Ontwerper |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 0021_02.00.03.0.jpg | x_02.00.03.a.jpg | x_02.00.03.d.jpg |  | kartono k plasto |  | GreenRats |

| Beschrijving |
|---|
| Kartludo 'Bestaj Silaboj'. Plastaj kartoj en kartona skatoleto. Tri kartoj (97 x 70 mm) kun klarigoj; ceteraj (49 x 69 mm) kun vortpartoj. Teksto sur la skatoleto: 'GreenRats \| Talk to the world  Talk Esperanto! \| Bestaj Silaboj en Esperanto \| Ideala kluba ludo tre taŭga por surplanka ludado'.  Surbaze de materialo kaj grafika aspektoj verŝajne datebla ĉ. 1990. Neniu informo trovita pri tiu ludo. EHC (Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg) havas plurajn serion de GreenRats-ludoj (t.n. memorludojn, ekz: La oficejo, Plantoj, Bestoj, Participoj), sed ne plian informon. |






| ID | Nr | Titel | Jaar | Datum in | Hoogte in mm | Breedte in mm | Diepte in mm | Plaats | Doos | Object | Attr |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0022 | 02.00.04.0 | Kontolibro VVKS-Esperanto | | 0000-00-00 | 270 | 174 | 15 | 02 | 00 | 04 | 0 |

| Afbeelding | Afbeelding2 | Afbeelding3 | Link naar website | Materiaal | Categorie | Ontwerper |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 0022_02.00.04.0.jpg | x_02.00.04.a.jpg | x_02.00.04.d.jpg | https://nl.wikipedia.org/wiki/vvks | papero, kartono | | |

| Beschrijving |
|---|
| Kontolibro de VVKS-Esperanto (flandra asocio de katolikaj skoltoj). Sur la kovrilo: 'BADEN POWELL BELGIAN SCOUTS \| ESPERANTO \| SEKRETARIEJO \| Kontolibro'. Sur antaŭa interna kovrilo manskribe (sed trastrekita) 'E.H. (pastro) E. Dries - pĉk 439645 - tel. 38.14.96' kaj stampile 'V.V.K.S. \| ESPERANTO'. La manskriba enskribo verŝajne rilatas al la kasisto. Unua enskribo: 31 oktobro 1925, lasta enskribo: 5 januaro 1970. Eble donacita de la familio Meurrens, Leuven. |